

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-roh Roy Rawson la pagato.

28 SETTEMBRE. 1933.

The S.A.E. is undertaking financial support for La Suda Kruco and is using the gazette as it has never been fully used before—to foster Esperanto in circles where it is at present only a name and nothing more.

It is the organization to which every Australian Esperantist naturally belongs. The committee of the S.A.E. are the younger adult members of the movement in Australia. If you are young you will support them; if you are older you will give your fullest co-operation, so that no energy or enthusiasm is wasted through lack of any guidance or counsel that your experience can offer. By so doing, you will ensure that the greatest measure of success crown the endeavors of this worthy enterprise; but, old or young, you must act now!

Hon. Secretary,

K. G. LINTON, 16 Chapel St., East St. Kilda, S2.

DE ANATOLE FRANCE.

(trad. Leti)

Pri Vortoj.

Kaj kiel ni povas difini vorton?
Per vortoj! vortoj! kiujn ni devas difini per aliaj vortoj, ili mem la temo de difino en simila maniero. Kaj kio estas vorto? Nur sono, murmuro, krio, grunto. La filozofoj peneg diferencigas inter la parolo de simioj kaj la nesilabigita lingvo de la animaloj. Sendube estas granda diferenco inter la du, sed ne komplete kaj fundamente, ĝi ne estas diferenco de speco. Ambaŭkaze estas nur murmuro, grunto, kaj se estas larĝa diferenco inter la lamentoj de Antigono morianta por la benota taglumo, kaj la ĥurlado de batita hundo, ĝi estas ambaŭkaze fluado de sonoj elverŝitaj por la suferanta karno. Ni konsentu, ke ni estas dotitaj per la parolpovo kiel estas la animaloj. Ĉu vi alspiras malkovri la sekretojn de la universo per la etaj vortoj, kiuj obligas al ambaŭ homoj kaj bestoj, ke ili esprimu ĝojon, doloron, dezirojn kaj timon, elkriu sian malŝaton, minacu malamikon, petegu amaton kaj tremigu la tuta aeron de la ĉielo per la tumulto de siaj emocioj? Kia fantastika penso!

Pri La Olimpaj Dioj.

La unu dio, se li faras eraron, alportas, detruon al ĉiuj, kiuj kredas al li. Eĉ se li estas saĝa, li havas nur unu solan specon de saĝeco taŭga al unu sola speco de la homo.

La dioj de la Grekoj—pro la diverseco de ilia karaktero—pli taŭgas al la diverseco de la homa temperamento. Ĉi tiuj dioj kunlogis harmonie, kvankam ili ne konsentis pri eĉ unu afero. En la Troja milito kelkaj helpis la Grekojn, aliaj la Trojanojn; Ĉi tiu mem instruis al la Grekoj la toleremon. Estis tiam dio por ĉiu temperamento. Afrodito por la voluptemoj. Palaso Ateno por la serĉanto de la saĝeco, k.t.p. Neniu el ĉi tiuj dioj estis sen malforteco, sed iliaj malfortecoj estis reciproke korektivaj.

En ĉio estis pli da belo kaj sindeteno ol da povo kaj grandeco. Ili ne desprimis siajn adorantojn per egeco.

Ili estis humanaj.

Ilia historio estis kredoble, sed vi rajtis ne kredi al ĝi. Nuntempe... La granda avantaĝo de la politeismo de la Grekoj estis, ke ne ekzistis dogmoj. Vi rajtis pensi kiel plaĉis al vi, eĉ pri la dioj, sen timo al io krom elia nedabra ekkolero pro minacitaj prezo-

gativoj aŭ ekscititaj pasioj. Sed la maltoleremo kun ĝiaj teruraj konsekvencoj estis nebla.

Mezepoka Milito.

En tiuj tempoj militpreparinta socio estis la sola konjektable. La tuta rimedaro de la nacio tiam estis uzata por starigadi militon.

Pri La Floroj.

Por la floroj, Amo, la rekreado de la speco, estas la granda afero. Kreskaĵoj estas staraj, ili ne havas la rimedojn de sindetendo apartenanta al animaloj, ĉar besto povas fuĝi: tial ĝia ĉefa okupado, estas certigi la daŭradon de sia speco. La tuta floro ekzistas por la Amo.

RADIO COLUMN.

We very much regret that the dates listed in the last number of "La Suda Kruc" for the Esperanto lessons from 3AR could not be adhered to. Occasionally it so happens that an alteration has to be made after this paper is printed. We would like readers to consider the dates given in future as subject to possible change. When an alteration is made it generally means that the lesson is given on the following Saturday night. Lessons will be given on the following dates at 7.45 p.m. The anecdotes given at the conclusion of the lessons are printed to enable beginners to check their pronunciation:

Oct. 7.—Iru supren, Toméjo, kaj alportu al mi la noktoelmezono de la infano," diris la patrino de Toméjo. "Mi ne volas," diris Toméjo.

"Ho, Toméjo! Se vi ne estas bonkora al via nova fratino, ŝi prenos al si flugilojn kaj forflugos en ĉielon."

"Nu, do, ŝi prenu al si flugilojn kaj flugu supren por la noktoelmezono."

Oct. 21.—La Knabo: "Ĉu vi iam ridis ĝis plorado?"

2a Knabo: "Ho jes. Hodiaŭ matene la patro sidigis sur najleton. Mi ridis ĝis li ekvidis min. Tiam mi ploris.

RESOLUTIONS PASSED BY A MEETING OF MELBOURNE ESPERANTISTS.

Saturday, 2nd Sept., 1933.

1. That this meeting of Esperantists, believing that the time is now opportune for more-intensive propaganda on behalf of the international language Esperanto, proposes that a society be formed with the aim in view; and the name of the said society be "The Society for the Advancement of Esperanto."—Moved by Mr. Drummond; seconded by Mr. Linton.

2. That the membership of the S.A.E. be open to all who are in sympathy with the aims of the Society.—Moved by Mr. Rawson; seconded by Miss E. Godfrey.

3a. That the membership be a subscription of 5/- per annum for each member, and 4/1/- per annum for a patron; both to be entitled to a free copy of the Suda Kruc.—Moved by Mr. Thomson; seconded by Mr. Linton.

3. That this Society adopt as its official organ "La Suda Kruc," and shall subsidise, as necessary, the said paper as the first charge on its funds.—Moved by Mr. Cook; seconded by Miss Walford.

4. That in urging people to join the S.A.E. it will be brought before them, that the immediate aim of the S.A.E. is to arrange for a striking propaganda article to appear in each number of the Suda Kruc, and for the paper to be sent regularly to prominent educationists, social workers and others, whose support would be of value in furthering the cause of Esperanto.—Moved by Mr. Linton; seconded by Mr. Banham.

Office-bearers were elected as follows:—Secretary, Mr. Linton; Treasurer, Mr. Cook; Committee, Miss L. Walford, Mr. E. A. Turner, Mr. S. Cullell, Mr. Chamberlain, Mr. R. Banham, Mr. R. R. Rawson, with power to add.

Kamaradoj.

Du kamaradoj sidas en kafejo kaj vikle babilas. Subite unu el ili rimarkas, ke la dua fiks ekrigardas per siaj okuloj la punkton en la enirejo kaj ne interrompas la rigardon.

"Kio tiel cin ekinteresis tie?"

RECENZOJ

La Sorĉistino el Kastilio: Salom Asch. Historia bildo. El la juda originalo tradukis Israel Lejzerowicz. 148 paĝoj. Eldonis "Literatura Mondo," agento ĉe ni. Prezo broŝ. 3.50 sv. fr., bindita 5 sv. fr.

La paĝoj de la juda historio estas kune gluitaj de sango. "La antikvaj egiptoj batalis kontraŭ la juda nacio, la mezepoko—kontraŭ la juda religio, la dudeka jarcento—kontraŭ la juda raso." Jes. En la nunaj tagoj strange aktuala estas ĉi tiu terura rakonto el la mezepoko. La kortaŭza ĉapitro en kiu la aŭtoro priskribas la publikon forbruligon de la trezoroj de la juda kulturo, per lerta parafrazo, povus esti kronikaĵo de lastatempa stultiga krime farita kontraŭ la homaro en certa centro de nia moderna civilizacio.

La rakonto estas interesa, malgraŭ la malĝoja medio en kiu ĝi disvolviĝas. Sed ne nur tio faras la verkon leginda. La aŭtoro sin montras zorga studinto de la periodo traktita: liaj observoj pri la diversaj, foje tre kuriozaj, konceptoj pri la Sankta Virino tenitaj de la tiamaj pentristoj; lia akralingva denuncio al la brutala, korupta superstiĉo de la tradicie kruelega plebo de Romo; liaj galplumaj vortdesegnoj de la ne malpli demonia persekutemo de la regantaj ekleziistoj kaj liaj satana ruzemo servigi siajn krimojn por ankoraŭ pli imponi antaŭ la trofacila kredemaĵo de la popolo—ĉio ĉi igas la verkon valora kontribuo al nia multifaceta literaturo.

La kuraĝo de la eldonintoj elpresejigis tian en mondon, kiu frontas novan sangoondon de kontraŭjuda besteco, vekas nian altan admiron.

S-ro I. Lejzerowicz, la tradukinto, mem sentinta defandanto de sia popolo, sukcesis doni vivoplenan prezentaĵon de ĉi verko, kiu devenas de la cerbo de

"la plej granda verkisto de l'juda literaturo."

La rad. med. liston de vortoj uzitaj de li, sed ne troveblaj en la Plena Vortaro. Tamen tiu listo ne estas kompleta; mankas almenaŭ anksi', fascini', iriti', rotundi', ritual', kaj skafandri'. Du radikoj uzitaj por la sama afero: fanat', fanatik'; rivel', revelaci'. 24. tururgis, 76 tururiga (teruris, terura). Kion signifas III, ektikis; 56 ŝia knedita muskola nuko? 128, trubadoro estas laŭ P.V. "Provenca poeto de la mezepoko," ne simpla anonca plactrumpetisto. 108, skafandrantaj en laĝetojn da sango (baraktantaj en laĝetoj da sango); 120 kaj aliloke, La patrino de l'amo, kies staturo (figuro) ili portas . . . 83, "metreso," uzita ankaŭ de Haefker, en senco de "kurtizano, pagita amafistino, amoretino" ne estas simpla "sinjorino." Maskituloj (maskitoj). Loth, Samson (Lot, Simŝon laŭ la Zam-a Biblio); 132, "gemaro," hebrea vorto, devas ricevi difinon en la posta listo.

Legante ĉi tiun kaj aliajn verkojn venas la penso, ke Esperantaj verkistoj devas pli rigore penadi akiri unuecon, ne nur pri la formoj sed ankaŭ pri la signifoj de vortoj, alie post ne longe tre povos iuj verkadi belajn volumojn ankaŭ pri la Esperanta semantiko. Ni celu kiel eble plej firman sencosamecon ĉe la apartaj vortoj de nia provizo, kaj evitu danĝeron, ke ĉi tiu havigu al si la karakteron de movanta sablo.

Realigo de Norma Socio, eld. Belisma-Koopera-Kulturejo. La 9a de serio verkita de Okamoto Rikiĉi, pritraktanta la rilatojn de l'etiko kaj la ekonomio. La aŭtoro de ĉi tiuj libretoj evidente havas tre evoluintan kapon, plus fortan senton de interhomia justeco. Se zorge studitaj, liaj skribaĵoj donas valorajn instigojn al la penso kune kun mirinda enrigardo en la animo de la moderne cerbumanta

japano. Interesatoj turnu sin al ni por plu informi.

Esperanto-Roman-Gazeto: F. Ellersiek, Wilms-str. 5, Berlin SW61. Duonmonata. Abono 6 markoj.

Unika entrepreno, per kiu s-ro E. celas meti antaŭ la E-istaron longan romanon per dudekajn kajerojn. La elektita rakonto, se ni povas juĝi laŭ la komencaĵo ĉapitroj, promesas eĉ superi la plejbonan "Tro Kio?", originale verkitan de s-ro E. antaŭ 15 jaroj.

Oomoto Internacia: la plej grande impona E. gazeto en Japanujo, nun aperas sur 34 paĝoj. Ĝia junio n-ro estas bonaspekta kaj varihava. Cefrolo estas disvastigita la religio de Deguĉi, sed precipe allogas por okcidentanoj ĝiaj artikoloj pri penso kaj vivo de la japana popolo, ankaŭ la tambure verkitaj recenzoj kaj pri-Esperantaj skribaĵoj de Jozef Major. Kredante ke la neologismo de certa E. eldona rondo estas principo danĝera por nia literaturo ĉe aziaj legantoj, nia ekshingaro sam-o ĝin atakas, sed ne klarigas kial ankaŭ en japanaj kaj ĉinaj verkoj troviĝas riĉabunde la malbenataĵo novradiko. Ni sentas jukon demandi, por kio J.M. direktas siajn sagojn preskaŭ solnure al Budapeŝto; li povas ankaŭ tiel atenti pri la rusoj, kiuj en sia "proleta" verkado konstante, senbride servigas al si novajn vortojn.

Interesa porjuda artikolo de Emma Osmond; Studo pri Lafcadio Hearn; japanlingva lecionaro, kaj aliaj, faras la gazeton konservinda. Ĝia agento ĉe ni estas L. Thomson. (Robbo.)

La kato kaj la telero.

Vizitante holandan vilaĝon, por ŝerzadi malnovajn meblojn, unu antikvaĵisto ekvidas sur la brika planko de la loĝejo de kamparano tre belan malnovan Delft teleron, en kiun la domastro metas trinkajn por sia kato.

—Ho! La bela kato! ekcrias la antikvaĵisto, mi volonte aĉetus ĝin.

La kamparano konsentas por dek florenoj. La akrinto foriras, kunportante la beston, poste li revenas:

—Ĉi vi bonvolus ankaŭ vendi al mi la teleron? li diras; mi ne havas tujon por meti la lakton por la kato. Mi donos al vi unu florenon por tiu ĉi malnovaĵaĉo.

—Ne, respondas la ruza kamparano, mi konservas ĉi tiun malnovaĵaĉon. Dank' al ĝi, mi jam vendis ses katojn.

Senprudento.

Unu sinjoro eniras en magazeno de juvelisto.

Mi deziras gravurigi interne de tiu ĉi ringo, kiun mi destinas por mia fianĉino, la jenajn vortojn: "Gastono al sia kara Margareto."

—Jes, sinjoro, sed tio eble estas senprudenta, vi ne plu povos utilligi tiun ringon, se F-ino Margareto, aŭ vi mem, ne plu same opinios.

—Vi estas tute prava. Tiam metu: "Gastono al sia unika amatinio."

(El "La Movado," Parizo.)

DO IT NOW!

5/-

Please accept my subscription of 21/- for one year to the Society for the Advancement of Esperanto, 169 Exhibition Street, Melbourne, C1, and forward monthly a copy of La Suda Krucio to each of the following:—

1 Name and Address for 5/-

4 Names and Addresses for 21/-

Your Own Signature

Your Own Address

"Mi observas MIAN palton; mi timas, ke oni ĝin ne ŝtelu. . . . La cian oni jam delonge forŝtelis."

Yesterday you met one who used to be an Esperantist. Send his name and address to the secretary of the S.A.E.

NI DEZIRUS SCII:—

Kiam Kalocsay donos al ni "Hamleton" en vesto de "moderna" Esperanto?

Kiam iu eldonejo aperigos la Tradukajaron de d-ro Zamenhof en formo kaj maniero inda la Majstro-laboren?

Kiam oni ĉesos troigi en la raportoj pri Es. progreso? (n-ro 5/1933 La Socialisto, "G. R. Sykes atendiĝis baldaŭn rekonon de E. en Aŭstralio").

Kiam certaj laŭte reklamitaj novaj gazetoj E-aj eldonos sian duan n-ro'n?

Kiam ne-Esperantaj kritikantoj de nia lingvo, asertante ke ĝi ne taŭgas por la literaturo, legos E-ajn verkojn kaj tiam verkos detalan analizon studon por pruvi la pravecon de sia sinteno?

Kiam la "British Esperantist" ĉesos la absurdaĵon presadi en la angla lingvo recenzojn pri E. libroj?

PRI "DE PAĜO AL PAĜO.

En la n-ro Nov-a-1932 de La S.K. aperas recenzo pri la supra verko de L. Totsche. En ĝi estas dirite, paĝo 11, ke "Totsche nomas la verkaron de Baghy kiel 'destinita por levi nian poezion al la nivelo de la plej eminentaj naciaj literaturoj'". S-ro T. plendas, ke mi citis frazon el lia libro kaj ĝin rilatigis al Baghy, kvankam estas evidente, ke la frazo ne rilatas al li. "Li estas prava, kaj mi petas pardonon por la eraro, kiu estigis por tro rapida lego. La plena frazo tekstas: "Nia literaturo fermentis, tie kaj tie ĝi sendepende de Baghy, eklaboris junaj viroj ĉirante la lingvon en tradukita aŭ originalaj versoj, sed ili plejparte laboris por si skribotabulo, nur foje kaj foje aperigante ion, inter ili ankaŭ tiu genio, kiu jam tiam konscie laboris pri sia verkaro, destinita por levi nian poezion al la nivelo de la plej eminentaj naciaj literaturoj."

Se mi nun rajtas konjekti, la aludo estas ne al Baghy, sed al Kalocsay. Se tio ĉi ne estas vera, sendube klarige skribos al La S.K. s-ro T., kiu je nia sincera bedaŭro kuŝas en aŭstria sanatorio. Resanon! (R.B.)

Junulo dez. kor. kun knabinoj el ĉiuj partoj de Aŭstralazio. J. Ivičević, G.P.O., Auckland, N.Z.

Coburg Esperanto Club:—Finaj aranĝoj estas farataj por la ĉara danc-kaj festvespero. Ĉeesti oni povas per simpla invito; klubanoj kaj aliaj E. societoj en Melbourne kaj ĉirkaŭ jam ricevis invitbiletojn. Jam de kelkaj monatoj progresintoj de la klubo vizitas sin reciproke ĉiun dusemajnon en siaj domoj. Nur E-on ili parolas ĉe tiuj kunvenoj, kio donas bonegan ekzercon al tiuj dezirantaj pliflugi la E. parolpovon. Ni proponas organizi E. lingvajn debatojn ĉe tiuj vesperoj, kompreneble aldone al la regulaj vendredvesperaj klasoj en la Labor-Hall.

Vorto ne trovebla en La Plena Vortaro, sed uzita en ĉi tiu numero. "Semantiko"; A. Semantics, semasiology; F. semantique.—Tiu branĉo de la filologio, kiu pritraktas la signifojn aŭ sencojn de vortoj; la scienco klarigi la disvolviĝon kaj ŝanĝojn de vortsignifoj.

Whom have you enlisted in the movement?

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF.

(N-ro 7)

—0—

Mi scias, ke tre multe da esperantistoj havas la fortan konvinkon, ke por Esperanto estos plej bone, se en la daŭro de mia tuta vivo mi persone restos la sola kaj plej alta aŭtoritato en nia afero, ĉar neniam eĉ plej saĝaj komitatoj povas per malvarma, multkapa kaj blinde palpanta rezonado trovi la efektivan bezonojn de nia lingvo tiel ĝuste kaj bone, kiel ilin trovas per sia sento kaj sperto tiu persono, kiu kreis la lingvon kaj laboris por ĝi kaj en ĝi tutan vivon. Mi konfesas, ke en rilato praktika tiu ĉi opinio havas en si multe da praveco. Sed ĝuste por tio, ke mia aŭtoritateco alportu al nia afero utilon anstataŭ malhelpo, estas necese, ke ĝi estu libervole kaj konscie akceptata, sed ne lege altrudata. Se la esperantistoj trovos, ke mia aŭtoritateco estas utila por nia afero, kio do malpermesos al ili ankaŭ poste rigardadi min kaj miajn verkojn kaj konsiliojn kiel aŭtoritajn? Kiu malpermesos al la Centra Komitato klarigadi al la esperantistoj, ke pro la bono de nia afero estas dezirinde, ke la esperantistoj, kiel eble pli imitadu mian stilon? La diferenco estas tia, kiam la esperantistoj propravole kaj konscie rigardados min kiel aŭtoritaton, tiam ili volonte penos ĉiam imitadi mian stilon, kaj nia lingvo multe gajnos de tio ĉi ĉar unueco kaj unuspiriteco estas por ĉiu lingvo multe pli grava ol la plej severa logikeco, se tiu ĉi logikeco ne

estas absolute senduba kaj egala ĉe ĉiuj; sed se mia aŭtoritateco estos altrudata de mi mem kaj se ĝi estos nur "necesaĵo", sekvo de foresto de la plej alta juĝantaro, tiam oni sekvados mian ekzemplon kaj konsiliojn nur tre nevolonte, kaj kiel ajn matura pripensita estus ĉiu mia ago, ĉiam multaj personoj trovos ĝin erara, neloĝika kaj senseca, kaj ni havos konstantan disputadon kaj opozicion."

(El letero al s-ro A. Michaux, 1905. Citita el "Originala Verkaro," paĝo 432.)

PROFESSOR LODEWYCKX REPLIES TO LA SUDA KRUCO.

(see article in last issue)

The University of Melbourne, August 26, 1933.

The Editor, "La Suda Kruc'o":

Dear Sir,—I have to thank you for sending me your last issue of "La Suda Kruc'o," in which you were good enough to devote an article to the series of talks which I gave recently over 3AR, one of which dealt with artificial languages.

Whilst realising that you would not find space to discuss fully all I said in a talk of twenty minutes, I am somewhat surprised that you are completely silent as to the content of 90 per cent. of my talk, dealing amongst other things with the advantages of Esperanto, and that you confine yourself to two points, viz., the strength of the organised Esperanto movement, and the fitness of Esperanto as a literary medium.

May I be allowed to reply briefly to your criticism on these two points. My statistical information is derived from Brockhaus and my round figure of 50,000 was more than 8000 above the actual 41,751 organised Esperantists in 1928. In order to avoid giving too many statistics, I omitted the 126,508 Esperantists of whom Dr. Dietterle at the time had trustworthy knowledge, but added that the actual number of people practising the language amounted probably to between 500,000 and a million. You say that authorities at the time calculated that it would approximate ten times 126,508, i.e., about 1,265,000. Of course this is mere guesswork; and even this very high estimate is not very much above my figure of 1,000,000.

And now the second point. You quote a number of writers, such as Zweig, Ossendowski, Renn, Baudouin, Babits, S. Lagerlof, who have testified to the fitness of Esperanto as a literary language. But surely you are aware that it would be very easy to quote as many authorities who hold opposite views. I shall not take up your space in doing so, but only refer to the opinion of Professor A. Meillet, the greatest representative of linguistic

science in France to-day. Meillet is rather favorable to the idea of an artificial auxiliary language and fully recognises the value of Esperanto as a vehicle for international intercourse, for scientific publications, etc.; but where it comes to the literary use of Esperanto, he is very sceptical and says:

"Les esperantistes ont commis des naivetes, ainsi quand ils ont traduit en esperanto de grandes œuvres littéraires universellement connues. La littérature est le dernier des usages auxquels peut être employée utilement une langue artificielle. Pour tout ce qui est du style, la littérature vit de la valeur expressive des mots et des tours de phrases, de l'originalité des ressources propres à chaque langue. Une langue artificielle se prête à l'expose pur et simple de faits et d'idées qui ne sont pas trop délicatement nuancées; mais elle est, par sa nature même, inapte à l'expression littéraire. Et, du jour où elle acquerrait le caractère expressif et idiomatique d'une langue traditionnelle, elle aurait perdu de ce fait les qualités essentielles qui lui donnent sa raison d'être." (A. Meillet, *Les Langues dans l'Europe Nouvelle*, 2nd edition, p. 281).

As you see, Meillet is far more emphatic than I am in denying the fitness of Esperanto to be used as a true literary language.

Before closing this letter I wish to add that, although not convinced that Esperanto is the best possible international language, I am in full sympathy with the aims of the Esperanto movement and wish you all possible success in your endeavors in Australia.

With kind regards,

Yours faithfully,

A. LODEWYCKX.

[The Esperantists have done some naive things, as, for instance, when they translated into Esperanto great works of literature known throughout the world. Literature is the last thing for which an artificial language can be usefully employed. In all that appertains to style, literature depends on the expressive value of words and of phrasing, on the originality of resources peculiar to each tongue. An artificial language stands ready, as it were, to set forth purely and simply such facts and ideas as are not too subtly nuanced; it is, by its very nature, unfitted for literary expression. The day that should see it acquire the expressive and idiomatic character of a traditional language, would see it to have lost, by virtue of that acquirement, the essential qualities that give to it its reason d'être. Translation of above French text, by "La S.K."]

Professor A. Lodewyckx.

Dear Sir,

I thank you sincerely for your letter of the 26th inst. and regret that the article in the S.K. was inadequate to cover your lectures. I merely picked out the two points that as an Esperantist I thought might provide comment.

We agree that the quoting of well-known names in favor or disfavor of Esperanto is more or less unprofitable. Such a procedure converts but few of those already convinced one way or the other. I would, however, beg leave to mention in connection with the name of Meillet that of the great Jespersen, who, although not stressing the literary potentialities of his Novial, nevertheless suffers "Mondo," the organ propagating his language, to publish in Novial pages of translated work distinctly literary. He himself in former years wrote Ido with effect in polemical articles. It is hard to believe that such a philosophic, penetrative mind as his could apply itself to the task of inventing a language without trying to incorporate in it those elements or characteristics which would give it the potentiality of becoming a literary tongue. If, as I believe is true, Jespersen holds the belief that an artificial tongue can become a finely discriminating literary instrument, then we have one great philologist against another.

In all my reading on the subject of inter. lang. during the past ten years I have never once seen a thoughtful, painstaking article or study written to disprove the fitness of Esperanto as a literary medium. Such an article should take the form of a detailed analysis of a given translation in Esperanto, compared faithfully with the original text. Such, of course, postulates an intimate knowledge not only of Esperanto grammar, but of Esperanto semantics, of the "literary" (I quote the word to avoid the imputation of begging the question) evolution and the tradition of the language. General, vague denials a-plenty, but no serious attempt to demonstrate the truth of the assertion. On the other hand, there are several finely wrought studies on the flexibility of Esperanto in translation. Prof. Collinson, several clergymen on the Hebrew Bible and the Esperanto version, and Prof. Waringhien, Lille Univ., in his "L'Esperanto et la Stylistique" have revealed a careful study of the question. The lack of studies of this kind unfavorable to Esperanto is the more remarkable when one considers the wide field offered to such criticism by the low standard of so much of our Esperanto translations. Of course, the fault here lies with those Esperantists who, possessing little or no literary sense, and furthermore in many cases having an incomplete mastery of the inter. lang., have undertaken work beyond their power or comprehension.

There is, however, work both in

prose and poetry that really merits the attention of those interested in the relation of international language to literature.

True it is that many scholars and men of affairs agree that Esperanto is well fitted to serve in the non-literary field—science, commerce, travel. It does seem rather a pity that a risk should be run of alienating this body of opinion by an undue stressing of the literary features of Esperanto. For after all this is a question that would answer itself in time, after the establishing of Esperanto in practical fields.

Touching the last sentence of Meillet quoted by you, I would say that certain leading Esperanto writers, headed by Kalocsay and the "Budapest school," are endeavoring to develop and enrich Esperanto by enlarging its vocabulary, elaborating for it a prosody, and experimenting with its syntax, after the manner of poets and word masters the world over. They affirm that Esperanto may well be developed along a literary path without in any way interfering with its simple grammar and vocabulary "of the people." Esperanto, as such, may always be easily learned by folk wishing to use it only for intercourse, and so on, and not to read its higher literature, which, as in the national languages, is only for those who are prepared to devote time and study to the appropriation of its treasures.

My dear sir, you will, I trust, regard yourself as being under no moral obligation to answer this unsolicited and lengthy letter, and accept my thanks for your kindness and sympathy in the matter.

I am,

Yours truly,

R. BANHAM.

University of Melbourne,
5 September, 1933.

The Editor, La Suda Krucio:

Dear Sir,

I thank you for your interesting letter which I received yesterday. I do not deny the possibility of Esperanto or another artificial language developing into a literary language. It only requires men of great literary genius using such a language for original production.

I think you might publish my letter of 26th August with your reply.

Yours faithfully,

A. LODEWYCKX.

Naivulo.

Sinjoro demandis sur la strato fiamkruton: Kiom oni pagas ĝis la stacidomo?—Tio ne kostas multan monon. Por vi mi volas kalkuli 10 kronojn.—Mi dankas, mi volis nur scii, kiom mi ŝparus, se mi piedirus.

REVENO

(de Henry Lawson)

—O:—

La fremdulo marŝis en la spicistan butikon, ĉe la stratangulo, kun la aspekto de viro, kiu estis reveninta post multaj jaroj, por vidi iun, kiu ĝojus lin vidi. Li demetis sian pakadon, kiu konsistis el volvitaj lankovriloj, de la ŝultro, kaj starigis ĝin kontraŭ la muro, kun intenco malrapideco; tiam li metis la kubuton sur la montrotablon, mankarensis la barbon, kaj ridetis ŝerme al la butikisto, kiu baldaŭ respondis per necerta rideto.

"Bonan tagon," diris la spicisto.

"Bonan tagon."—Paŭzo.

"Bela tago," diris la spicisto.

"Jes—estas bela tago."—Paŭzo.

"Ĉu mi povas servi al vi?"

"Jes—diru al la maljunulo, ke estas viro kiu volas paroli kun li por unu momento."

"Maljunulo? Kiu maljunulo?"

"Hake, kompreneble—maljuna Ben Hake! Ĉu li ne estas hejme?"

La spicisto ridetis.

"Hake ne estas ĉi-tie nun. Mi estas ĉi-tie."

"Kiel tio okazas?"

"Nu—li vendis la butikon al mi antaŭ dek jaroj."

"Nu—mi supozas ke mi trovas lin ie en la vilaĝo?"

"Mi pensas, ke ne. Li forlasis la kamparon, kiam li vendis la butikon. Li—li estas mortinta nun."

"Mortinta! Maljuna Ben Hake?"

"Jes. Vi konis lin, ĉu ne?"

La fremdulo ŝajne estis perdinta ion de sia kredo. Li turnis sian flankon al la montrotablo; apogis sian kubuton sur ĝin, kaj rigardadis tra la pordo, laŭ la Sunsubira Vojo.

"Vi povas doni al mi duonfunton da tabako," li diris kviete. "Mi supozas, ke juna Hake estas en la vilaĝo?"

"Ne, la tuta familio foriris. Mi pensas, ke unu el la filoj estas negociisto en Sydney nun."

"Mi supozas, ke la McLachlan familio ankoraŭ loĝas ĉi-tie."

"Ne—La maljunaj gepatroj mortis antaŭ kvin aŭ ses jaroj; la filoj estas en Kvinslando, mi pensas, kaj ambaŭ filinoj edziniĝis kaj loĝas en Sydney."

"Ah—nu!—Mi vidis, ke vi havas la fervojon ĉi-tie nun?"

"O, jes. Ses jarojn!"

"La tempoj multe ŝanĝiĝis."

"Jes, certe."

"Mi supozas—mi supozas, ke vi povas diri al mi kie trovi maljunan Jimmy Nowlett?"

"Jimmy Nowlett? Mi neniam aŭdis tiun nomon. Kion li faris?"

"Li estis 'bullocky' (1)." Li portadis komercaĵojn de la montoj, antaŭ ol la fervojo venis."

"Eble antaŭ mia alveno. Neniu de tiu nomo loĝas ĉi-tie nun."

"Nu, do.—Vi povas doni al mi funton da sukero."

"Bone. Ĉu estas longe depost via lasta vizito al ĉi-tiu vilaĝo?"

"Dek kvin jarojn.—Mi supozas, ke mi ne memorigas vin pri iu, kiu loĝas ĉi-tie?"

"N-ne!" diris la spicisto, ridetante. "Mi ne povas diri tion."

"Nu, do.—Certe la homoj loĝas en la sama loko?"

"Ne—la maljunulo mortis kaj—"

"Kaj kie estas Jim? Jim ne mortis?"

"Ne—li edziĝis kaj iris al Sydney." Longa paŭzo.

"Ĉu vi povas—diris la fremdulo, hezite. "Ĉu vi—mi supozas, ke vi konis Mary Wild?"

"Mary?" ridetis la spicisto. Tio estis la fraŭlina nomo de mia edzino. Ĉu vi ŝatus sin vidi?"

"Ne, ne! Eble ŝi ne memorus min."

Li rapide prenis sian volvitajn lankovrilojn kaj metis la pakadon sur la ŝultrojn.

"Nu—mi devas iri."

"Mi supozas, ke vi kampas ĉi-tie por Kristnasko?"

"Ne—estas nenia kialo—mi iros antaŭen. Mi intencis pasigi Kristnaskon ĉi-tie. Fakte, mi venis de malproksime, tiucele. Mi intencis pasigi unu Kristnaskon plii kun maljuna Ben Hake kaj la aliajn knaboj—sed mi ne sciis, ke ili moviĝis tiel malproksimen al la okcidento. La malnovaj kamparuloj formortas."

Estis rideto en liaj okuloj, sed la barbkovritaj lipoj iom tremetis.

"La tempoj ŝanĝiĝis. La malnovaj domoj aspektas same, kaj la malnovaj pensignoj bezonas kolorigon, same kiel antaŭe: kaj jen estas tiu malnova barilo, kiun mi kaj Jimmy Nowlett kaj Ben Hake konstruis antaŭ dudek jaroj. Mi estas marŝinta kaj vojaĝinta longajn distancojn depost tiu tempo. Sed la tempoj ŝanĝiĝis—almenaŭ la homoj ŝanĝiĝis.—Nu, mi devas ekiri. Estas nenio por deteni min ĉi-tie. Mi reiros laŭ la vojo. Estas pli malvarmete,

marŝadi dum la nokto."

"Jes.—Nu, adiaŭ."

"Bonan tagon. Gajan Kristnaskon!"

"Ĥh? Kio? Ho, jes. La saman al vi. Adiaŭ!"

"Adiaŭ!"

Li forvojaĝis, for laŭ la Sunsubira Vojo.

(Tradukis M. C.)

(1) "bullocky": veturigisto de ĉaro trenata de kastritaj bovoj. En Aŭstralio oni multe uzas tiajn por transporti lanopakegojn kaj grensakojn de la bienoj al la fervojstacioj.

CONCERNING "HAMLET."

(See p. 60, La S.K., June, 1933.)

—O:—

On this interesting problem we have received the following letter:—

Maradomo, Glan-y-mor Road, Penrhyn Bay, Caernarvonshire, Wales, 31 July, 1933.

Dear samideano,

The word **tempo** is not a printer's error; the correct word **tempo** appears in the original (1894) edition of *Hamlet*, which forms part of the "Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto"; and when Zamenhof compiled the "Fundamenta Krestomatio" in 1903 he included the first act of *Hamlet* and restored many of the original forms, **tempo** being among the number; see F.K., p. 423.

After the publication of Dr. Pierre Corret's article in "The British Esperantist" of May, 1920, I corresponded with him on the subject. There cannot be any doubt that the unnamed "korektisto" was de Beaufront. Dr. Corret wrote to me that de Beaufront "akre plendis" of the restoration of the original words in the Krestomatio.

Regarding the extract from Hamlet quoted in "La Suda Kruc" of June 12, 1933, it should be noted that, in four editions which I have consulted, there are commas before and after the word **creŝcent**; this marks the said word as an imperfect participle, and clearly justifies Zamenhof's choice of **kreskante** in preference to **kreskanta**. The word **sama** occurs in all editions of *Hamlet*, but in the English I cannot find anything to suggest **sama**, nor **sana**, nor any word which might have been misprinted **sama**. In the fifth line the English "grows wide," demands "larĝiĝas" rather than "ŝanĝiĝas"; "malico" has no counterpart in the English;

cautel (old French cautelle) signifis cunning, subtlety. Zamenhof's seventh line might well be replaced by the following (if alteration were thinkable):

Nenia malpuraĵo nun makulas.

It seems to me that Zamenhof's rendering, with the few changes here suggested, gives an entirely satisfactory idea of the English original; and bearing in mind that his translation was made by way of a German one, we see convincing evidence of the fact that Zamenhof was, in Fraser Tytler's words, "a man of no ordinary skill."

I am,

Cordially yours,

William Bailey (L. Akad.).

FROM THE BRITISH ESPERANTIST OF MAY, 1920.

The following excerpt from the article written by Dr. P. Corret in the above issue throws further light on the matter:

"Antaŭ mi, sur la tablo, kuŝas du libroj, du frataj libroj: malnovaj verkoj de d-ro Zamenhof, La Batalo de P'vivo kaj Hamleto,—sed tamen kiom malsamaj!"

"Ili ja ne estas originalaj! Eldonoj, sed nur reprezentoj, kaj la reprezentito uzis du tre malsamajn metodojn. La unua libro redonas al ni tute fidele originalan tradukon, faritan en la unuaĵaro de Esperanto; la dua estas bedaŭrinde difektita de iu teorema 'korektisto', kiu faris en ĝi ŝanĝojn, ĉiujne sen la aprobo de la tradukinto. D-ro Zamenhof ja konstante uzadis ankoraŭ ĉiam post la represo de Hamleto formojn el ĝi forigitajn."

"D-ro Zamenhof skribis:

Kun la kreskado de la templo
Ŝanĝigas la spirito kaj la servo
Interne.

"Evidente preseraro, diris al si la korektisto. 'Tie-ĉi Laerto parolas al sia fratino pri la amo de Hamleto kaj diras, ke ĝi sendube forpasos samtempe kun lia ĵuneco. Evidente, la parolo estas pri forpaso de tempo, kaj ne pri la templo'. . . . Kaj li tie kontente ankstatis ĝis 'templo' per tempo, ne rimarkante, ke Laerto komparas la homan korpon kun templo en kiu la spirito-pastro 'faras servon interne.' Shakespeare skribis: 'as this temple waxes, the inward service of the mind and soul grows wide withal!'"

[La S.K. thanks Mr. Bailey for his kind interest and help.]

Jurnalisto: Kiaspecan reserĉon nun faras la profesoro?

Servisto: Plejmulton de l'tempo li serĉadas la okulvitrojn.

Do you enjoy reading "La Suda Kruc"? Tell others about it.

EL GERMANA PLUMO

La jeno estas eltirita el "La Mortado," de Prof-o Hermann Nothnagel, trad. B. Selzer.

"La terurplenaj opinioj pri la fizika mortado plej multe ekzistas nur en la imagoj. Vere turmentoplena ĝi estas nur en malmultaj okazoj, kaj ĉuste tiam plejparte la homo mem faras al siaj kunhomoj: morton per fajro kaj torturoj. La naturo estas multe pli kompatema ol la homo—se ĝi sole kaj ĉiam povus efikadi kaj se la homo gento alvenus ĝis la natura fino de la vivo, vere, ni povus pri la mortado pensi tiel, kiel laculo spiras la dormon, la dolcan konsolanton kaj refreŝiganton. Sed ankaŭ preskaŭ ĉie cetero, kie ĝi mem kondukas al la mortado, ĝi kompreneble disetendas vualon, por kaŝi la timon kaj teruron de sia tremanta kreitaĵo. Ne fizike estas turmenta la mortado—turmenta estas la anima mort-angoro.

"Kaj ĉi tiu lasta?

"Unu troege estimata amiko ofte esprimis la deziron, povi ĉe klara konscio disigi de la vivo. Tiu ĉi deziro estis tiel urĝa, ke li postulis de sia kuracisto, kiu al mi tiam rakontis, la neplan promeson, certe malkaŝi al li, kiam laŭ homa antaŭvideblo lia fino alvenos. Li estis malsana je kalkigo de la kronaj arterioj de la koro kaj de kaŭzitaĵoj de tio fortaj atakoj. Dum tia atako lia kuracisto konsilanto diris al li: 'Nun la stato estas supeble serioza.' Tiam li kunvokis sian familion kaj pasigis kun ĝi en soleco ankoraŭ kelkajn tagojn en seĝena ĉambravileco, en mensa ekvilibro, kviete atendant la finon—kiel sublima modelo de klaranima homeco. Estas vero, li estis virto, kiu, en sia ĵuneco, ofte persone intertritis kun Goethe, kaj kiam li, postrestinta ideala figuro el la grandaj oraj tagoj de Jena (1), fariĝis maljunulo, oni prave pri li diris: Neniu foriris de li sen la sento, ke li fariĝis pli bona.

Kial io puŝas min, memori ĉi tie tiun subliman homon? Ĉar lia dignoplena ekzemplo instruas, kiel homo saĝa kaj bona pensas pri la mortado. Estas vero, ke nur malmultaj luktas kaj atingas tiun ĉi majestecan de la menso; ĉe malmultaj nur, uzante la vortojn de Sokrates, la bona demono parolas en la brusto tiel laŭte, ke ili nenion aŭdas krom la tono de lia voĉo, kaj ĉe tiu forgesas je mortado kaj morto. Sed tiuj ĉi malmultaj estas liberaj de la efektiva teruro de l'morto, de la anima mort-angoro. Ili povas, kiel Sokrates, kiam li devis trinki la kalikon da veneno, eldiri: "Nu do Kriton, fartu bone! Se la dioj tiel volas, ĝi estu!"

(1) Jena: germana universitata urbo, centro de kulturo.

Wideawake Esperantists belong to the S.A.E. Do you?

LA DOMBRULO.

Ekzistas kelkaj vortoj, kiuj terure frapas la homokorojn. Milito, pesto, ŝpipeco, dombrulo. Militon kaŭzas la egoismo de la nacioj; pesto venas pro malpuro kaj nezorgo. Kiam venas la grandaj ventegoj ĉe lerta direktado ne povas maleligi ŝpipeco. Sed dombrulo estas farata de la destino; ĝi estas malatendita, tial pli terura. Jen tie staras loĝejo, sekvantan tagon ĝi ne estas plu tia, sed nur bulo da cindroj. Saltaĵo fariĝas el ankoraŭ ardatanta brulaĵo kaj ekflamiĝas la domo.

En malproksimo la ĉielo estas ruĝa, kaj homoj ekmaras el ĉi tiu domo, por ke ili vivu la spektaklon. Tra pordegoj markitaj "Privata" iras ni, ne atentante. Ni promenas sur la florbedojn de fremdaj homoj, por ke ni pli oportune rigardadu. Altrapidas la fajrobriĝado, trembrilas la flamoj sur la kaskoj de la estingistoj. Ŝanĝigas en sangokoloron la akvo de la ŝprucmaŝino, tordigas kiel serpento la fleksiblaĵo tuboj sur pavidoj. Igas glitigaj la vojoj, tamen ankoraŭ venadas homoj, ankoraŭ forkonsumiĝas en flamojn la domo.

La brulanta konstruo estas tiu de la gardisto, kiu prizorgas la pilkulan herbejon. Anoj de la pilkula klubo ĉealtas de angoro, vidante pezajn botojn paŝegi sur ilian belan parketon.

Eĉ kiam oni jam estingis la flamojn, ankoraŭ, alpuŝigis scidezirojn, por fikse rigardi la ruĝon, sed—ni enokule havas cindreton, do devas foriri.

Originale J. Gray.

La Preternacio Konstancio.

Regas tie la Reĝo, sur konstanta tronseĝo.

Kaj en forma etero de la propra Am-Leĝo.

Atentu, aventurulo! Per la Krist-fratinito (Elkreskantimo de la cerbo de brita bubo), jam naskiĝis surteran LA PRETERNACIO KONSTANCIO. Tio ĉi estas nek Religio, nek Teorio, nek Scienco, nek ia Ismo, sed vera viva afektiva REGNO. Ĉiam staras malferma la nefininda pordego de Konstancio: tamen, bone komprenu la fakto enironton, ke, enirante, li tuj do submetas sin en la manojn kaj povon de la Ties Dio, la leĝo de Konstancio, la leĝo de l' AMO-MEM.

Por pliaj liberaj klarigoj, vole perpostu al K'ano Joab Eliot, 2 Cambridge St. WILLOUGHBY, N.S.W., Australio.

Pri spegulo, kaj kiel ĝi rompiĝis.

Kiam ni atingas la finon de ĉi tiu historio ni scios pli ol ni scias nun, ĉar ĝi temas pri malbona sorĉisto, unu el la plej fifaraj sorĉistoj. Unu tagon li sentis grandan ĝojon, ĉar li faris spegulon, kiu havis ĉi tiun propecon, ke kio ajn bona aŭ bela, kiam reilektata en ĝi, etigis preskaŭ ĝis nenio, sed kio ajn seninda kaj okulmalplaĉa aperis en ĝi klare, kaj farigis eĉ pli malbela. La plej belaj pezaĵoj, kiam vidataj en ĝi, aspektis nur kiel kuirita spinaĵo, kaj eĉ belvizaĝaj personoj farigis fortimige malbele, aŭ staris sur sia kapo kaj aspektis ridindaj. La vizaĝoj estis tiel distorditaj, ke ili ne povis esti rekonataj, kaj se iu havis lanugeron, kiel ajn malgrandan, ĝi nepre etendiĝis sur nazon kaj buŝon. Kiam io bona aŭ senpeka eniris la homajn kapojn, estis ridaĵo sur la vizaĝo de la spegulo, kaj la sorĉisto tutkore ridis pro sia sagace elpensita inventaĵo. Ĉiuj, kiuj vizitadis lian lernejon de magio, anoncis ĉie, ke miraklo okazis, kaj ke nun, por la unua fojo, oni povas vidi tion, kio vere estas la homo kaj la mondo. Ili ĉirkaŭkuris ĉie kun la spegulo, ĝis fine ekzistis neniu homo kaj lando, kiuj ne estis distorditaj per ĝi. Ne kontentaj pro ĉio tio, ili superflugis al la ĉielo kun ĝi; sed la spegulo tiel forte skuigis pro sia propra ridaĵo, ke ĝi elglitis, el liaj manoj, kaj falinte malsupren ĝis la tero, rompiĝis en centojn da milionoj da bilionoj da pecetoj kaj eĉ pli; kio kaŭzis pli grandan malutilon ol antaŭe, ĉar kelkaj el la pecoj estis ne pli grandaj ol pulvero. Ĉi tiuj ĉirkaŭflugadis en la aero, kaj kiuj ajn ricevis ilin en la okulojn, tiu vidis la tutan homan rason distordita, ĉar ĉiu peceto, kiel ajn malgranda, konservis la propecon de la tuta spegulo. Kelkaj homoj eĉ ricevis malgrandan pecon de la spegulo en sia koro, kaj tio estis terura, ĉar la koro farigis kiel bulo da glacio. Kelkaj el la pecoj estis tiel grandaj, ke ili estis uzataj kiel fenestrovitroj, sed tra tiajn oni ne saĝe rigardas al amiko. Aliaj pecoj estis fabrikataj kiel okultvitroj, kaj tiam ĉio ja malĝustigis, precipe kiam personoj surmetis ilin, por ke ili bone vidu kaj justu age. Kaj iom de la polvo de la disrompita spegulo ankoraŭ ĉirkaŭflugas en la aero, kiel oni malfeliĉe vidas en ĉiu tago.—E.C.

Which treats of a Looking-glass and the Broken Pieces.

When we have got to the end of this story we shall know more than we do now, for it is of a wicked sorcerer, one of the very worst sorcerers. One day he was in high glee, for he had made a looking-glass which possessed this peculiarity, that everything good or beautiful reflected in it dwindled down to almost nothing, but whatever was worthless and unsightly stood out boldly, and became still worse. The most beautiful landscapes, when seen in it, looked only like cooked spinach, and even handsome people became repulsive, or stood on their heads and looked ridiculous. The faces were so distorted that they could not be recognised, and if anyone had a freckle, never mind how small, it was sure to spread over the nose and mouth. When anything good or innocent entered a man's head, there was a grin on the face of the looking-glass, and the sorcerer laughed heartily at his ingenious invention. All who attended his school of magic related everywhere that a miracle had happened, and that now, for the first time, one could see what man and the world really were. They ran about everywhere with the looking-glass, till at last there was no man and no country that had not been distorted by it. Not satisfied with this, they flew up towards heaven with it; but the looking-glass shook so violently with its own grinning that it slipped out of their hands; and having fallen down to the earth it broke into hundreds of millions of billions of pieces, and still more, which caused greater mischief than ever, for some of the pieces were no larger than dust, and these flying about in the air, whoever got them in his eyes saw the whole human race distorted, for each particle, however small, retained the peculiarity of the whole looking-glass. Some men even got a small piece of the glass in their hearts, and that was dreadful, for the heart became like a lump of ice. Some of the pieces were so large that they were used for panes of window-glass, but it would not do to look at one's friends through them. Other pieces got made into spectacles, and then indeed all went wrong, particularly when people put them on in order to see right and to be just.

And some of the dust of the broken glass is still flying about in the air, as is seen, unfortunately, every day.

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Millar, 73 Berkeley-st., Victoria Park, Perth. Komunikaĵojn al la sekretario.

Masterton (N.Z.) Esperanto Club.—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Worksood-rd., Masterton. Visitors welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Society kunvenas ĉiutage je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram

Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O. Melbourne. Kunvenoj: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18h.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Viceprezidanto: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Coburg Esperanto-Grupo.—Kunvenas ĉiun ĵaŭdon je la 8a vespere ĉe la Labour

Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigataj.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following:—Miss Saw, 4/6, July, '34; Coburg Esperanto Group (sales), 8/8; Mr. N. M. Bell, 5/-, May, '34; Melbourne Esperanto Club (subs.), July, 18/-; (sales) July, 12/10; Mr. J. Mader, 5/-, Aug., '34; Mr. H. Byatt, 4/6, July, '34; Mr. H. V. Taylor, 4/6, Sept., '34; Miss L. R. Bell, 4/6, July, '34; Miss Jean Searle, 4/6, Sept., '34; Melbourne Esperanto Club (subs.), Aug., 11/4/-; (sales) 4/4; Mr. D. McInnis, 9/-, July, '34; Adelaide Esperanto Club (sales), 12/-; Mr. D. P. Mason, 4/6, Sept., '34; Miss Cox (adv.), 2/-.